# LA JUNA PENSO

# KVARFOLIA TRIFOLIO

(Poemaro)



Idioto de l'Vilaĝo
Mi jen estis, sen kontesto;
Mi konsentas sen protesto,
Kaj nun celas al Novpaĝo.

B.G.D.

La Juna Penso - F 47 - Laroque-Timbaut
Junio 1971 - N° 78 A

# INICADO (Unua averto)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Ĉar jam de milokcent sesdektri miljaroj (°)
Jen nia Homaro sur Tero ekzistas;
Ĉar ĝia provizo da vivoesperoj
Tridektri jarcentoj ankoraŭ nun estas;
Ĉar ĝi analogas al homo mortonto
Cent dudek jaraĝa, kun vivorestaĵo
Nur kvardekok taga; ĉar tiu dedukto,
Al mi mem nur propra, estiĝos faktaĵo
Post dudek jarcentoj, laŭ sperta deklaro
De Terfizikisto Usona en Moskvo,
Dum jaro 1966, al aro
De Internacia Kongreso: jen pruvo!
Ĉar tiu konfirmo pravigas demandon
Sintrudan pri nuna la ordo socia,
Kaj provon starigi Tutmondan Novordon,
Por kune labori en lumo plenscia
Pri la evoluaj finceloj homaraj,
Per interkonsento de ĉiuj teranoj;
Kaj, ĉar la nuntempaj metodoj gangsteraj
De kapitalismo fiaskis en manoj
De nekapablulој kredantaj sin dioj;
Okultaj agantoj en tuta la Mondo,
Kabalaj regantoj de l'sep eklezioj,
Pacopredikantoj nur "pro la fasado",
Sed jen prezidantoj de armilfabrikoj;
Petantoj almozaj por popolmalsato
Sed kastelloĝantoj sen kromaj mistikoj;
Fiekspluatantoj per leĝo kaj ŝtato
De stulte naiva la fido popola,
Kredanta humile je l'falsaj paŝtistoj,
Dum tiuj nur zorgas pri buĉo regula,
Tondado kaj vendo por propraj profitoj;
Ĉar plue alvenas la horo dudektri
Ĉe fino de nia dudeka jarcento,
Ke urĝas nuntempe ekzorgi ni mem pri
La sorto ja nia sen plua prokrasto,
Mi, hom' memstaranto, zorganta homdignon,
Libera aganto kun homa konscio,
Ĉi tie alportas mem propran la ŝtonon
Al Templo homara de Nova Socio.
Ĝi al sincerulој alportu prosperon!
Ŝirigu por ili la lasta vualo!
Sed por mensogistoj predantaj la Teron,
Ĝi iĝu detrua la ŝton' de skandalo!

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

(°) Temas ĉi tie nur pri teoriaj ciferoj ekster la implikiteco de la diversaj evolucikloj, kiu iom aliigas ilin . Verserĉantoj mem ilin reĝustigu.

En Pantin la 3an/I/1970.

B.G.D

# Inicado (Dua averto)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Tuta Kosmo, Sunsistemo, Ter' kaj Homo,
Jen la skaloj, kadroj de l'Evoluo!
Esti, kreski, ami, morti, sen kromdogmo,
Ĉies estoj jen la aĝoj dum Vivfluo.
Jen la nepra kaj sekvenda Vivprincipo
Por atingi mem, sen pero, al la Vero.
Jen arjana la fadeno kaj Leĝtipo
Kondukanta al mensklaro kaj libero.
Ĝin memoru kaj neniam ĝin forgesu
Post eniro en l'obskura labirinto;
Se ne certas ci pri tio, tuj regresu!
Ĉar nur morton ci atingus, trofidinto!
Jen la ilo, sed ĝin uzi nure rajtas
La bonvolaj kaj humilaj sinceruloj,
Kiuj mem pri Di' kaj Vero antaŭcertas
Kaj pluservas sen bedaŭroj, kun skrupuloj.
Sed se jam ci de l'komenco firme fidas,
Ke kromestas ekster Vero nur eraro,
Se ci dian la Justecon alkonfidas
Kaj nur celas al feliĉo de l'Homaro,
Do, eniru la Vojeton pririditan
Kaj pretiĝu por elprovoj kaj oferoj;
Harditiĝu por alfronti sorton spitan
Kaj rezisti al doloroj kaj suferoj.
Ĉar ci estos malavare provizita
Per plej senkompataj testoj kaj primokoj;
Maljustece kaj komplete senigita
Je amatoj, fratoj, idoj kaj amikoj.
Cia vivo jen fariĝos nur dezerto
Kaj soleco cia havo plej valora;
Homĉeesto por ci iĝos nur averto
Pri malmilda nova sperto tre dolora.
En laboro ci tutcerte ~~ne~~ sukcesos,
Eĉ se estas ci l'unua en metio;
Cin aliaj miskapablaj antaŭpasos,
Iĝos ĉefoj kaj komandos en medio,
Dum ci staros sen honoroj kaj sen grado,
Misŝatata, malhelpata, mispagata;
Per reala nevidebla socikrado
Nevenkeble de l'aliaj disigata.
Se ci tamen, malgraŭ miaj la konsiloj,
Volas celi kun memfido al la Vero,
Kaj plupaŝi sur la Vojo de l'Saĝuloj,
Ĉiam timu pri fiem' al malespero.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 22an/2/1970.

B.G.D

# Inicado (Tria averto)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Memspertiĝo pri Vervojo cin incitas;
Ĉiujn miajn la konsilojn ci nur spitas;
Malavare ci elspezas proprajn fortojn
Por kompreni senmisterajn simplajn vortojn.
Por ci estus ja prefere ne insisti,
Kaj admonon de Saĝulo ne rezisti.
Por l'afero ci ne ŝajnas tre dotita,
Do, je kio pluutilus peno spita?
Kvankam neta estis mia la klarigo,
En sunbrilo staŭlas ci samkiel strigo.
Tro da lumo ne toleras la okuloj,
Kiuj estas de naskiĝo noktspertuloj.
Kvardek jarojn mi bezonis por kompreni...
Ĉu ci povos saman tempon mem elteni?
Jam ĉe l'pordo ci baraktas senkomprene,
Kiel povus ci obstaklojn venki pene?
Ĉu ne devas mi cin helpi kun bonvolo,
Se ne estas cia celo nur scivolo?
Al neniu mi mem ŝuldas mian scion,
Kiu rajtus min defendi fari tion?
Mem de Dio mi ne timas anatemon,
Kaj de homoj eĉ ne zorgas fiagemon.
Kiu diris ja plej prave: "Ĉu kandelon
Eklumigi por ĝin meti sub buŝelon?"
Ĉu utilus ja tutviva homa peno
Por finfine prirezigni kun sereno?
Tiel homo memstarigas mondkoncepton,
Kiel arbo finproduktas propran frukton;
Kiam estas ĝi matura ĝi ekfalas,
Kaj al tiu, kiu volas, ĝi utilas;
Sekve, kiu prave povus eĉ pripensi,
Ke la arbo donu frukton malpermesi?
Do, aŭskultu ci atente, sen repliki;
Ĉar ne provas mi ĉi tie cin konvinki;
Nur deziras al ci helpi sur la Vojo,
Se ci celas al la Vero sen orgojlo.
Sed necesas, ke ci plugu propran sulkon,
Kaj pro tio al ci donos nur indikon.
Nur unika Vivprincipo en Naturo,
De atom' ĝis Kosmo, zorgas pri strukturo;
Koni ĝin ni povas per analogio,
Kaj spertado pri reala transkonscio.
Per la "4" la pordon fine ci malfermos...
Sed sufiĉas! Provu nur kaj spert' konfirmos.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 25an/2/1970.

B.G.D.

# Inicado (Kvara averto)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Ĉu kiel ci tiel mi iam mallertis?
Mi ne plu memoras...alion mi spertis!
Turniĝas ci kvazaŭ klukanta kokino,
Trovinte ŝlosilon ĉe grundoskrapfino;
Al ci ne utilas ĉi tiu penpago:
Konvenas ne tio por la ezofago!
Ci devas unue aliel tendenci,
Kaj ĉion lernitan per ci mem repensi.
Pri kono forlasi koncepton banalan,
Sincere alceli novscion realan.
Sur Vojo al Vero, migranta kaj sola,
Per daŭra spertiĝo kaj agad' memvola,
De stato racia ĝis al transkonscio
Atingi per helpo de propra ...racio.
Al kono alvenas plej nepre la homo,
Se siajn kapablojn ĝi uzas sen dogmo.
Ne nur raciema ĝi estas efike,
Ĝi ankaŭ imagas, rezonas logike;
Kapablas koncepti kaj plie memkrei,
Memeksperimenti, sukcesi aŭ ...vei!
Sed tiel ne gravas fiask' aŭ sukceso,
Nur gravas akiro por ia progreso;
Praviga aŭ ne la tutfreŝa rezulto
Fariĝos novbazo por plua eksalto.
Kaj tiel, senĉese trovanta novbazojn,
Jen homo multigas la sciookazojn,
Naturajn rilatojn pli kaj pli komprenas,
Konstante al novaj konceptoj alvenas.
Ĝi kvazaŭ vekiĝas el sonĝo profunda,
El longa ripozo de dormo fekunda,
Rigardas la vivon nun tute malblinde,
Vojaĝas tra l'Tempo facile, mirinde!
Estinto, Estonto fariĝas nur vortoj;
Ĉirkaŭe sin montras amikoj kaj fratoj,
De Ciklo al Ciklo migrantaj komune,
Kaj saman la sorton elportas ja kune...
Sed tion ne povas ci nun jam kompreni...
Mi miras, ke ci eĉ kapablis elteni;
Sed se mi nur fidas je cia okulo,
Ci baldaŭ min taksos ja nur frenezulo,
Kaj pluopinios: "Erare mi paŝis!
La olda kreteno sin fine malkaŝis! "
Jen grava Vojbaro: ĉu daŭri kun fido?
Nur ci mem cin helpu por tiu decido.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 28an/2/1970.

B.G.D

# Inicado (Kvina averto)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Gratuli mi devas: finfine ci venkis!
Pro tiu Vojbaro jam multaj fiaskis.
Per ago memfida, spitante dubemon,
Ci nun finsukcesis provoki eklumon.
Nur per memspertado jen homo atingas
Al homo reala kaj Veron distingas.
Sed la nur zorgantaj pri mokoj de homoj,
Neniam konscios pri konoj trans emoj;
Samloke paŝados en vana provpeno,
Ĉe sojlo de l'Templo sen plua kompreno.
Nur vere sinceraj kapablas eniri,
Kaj lumon de kono persone akiri,
Por, iom post iom, sin plipurigante,
Al la nesciantoj memlumi malvante.
Ci nun jam ekstaras en transa stadio:
Demetas la maskon ĉi tie la Mio.
En milda menslumo ci banas trankvile,
Kaj tra la vitraĵo rigardas humile.
Foriĝis vualo kaŝinte Realon:
De l'Mondo ci vidas nun klare la malon.
Ci konis scenejon nur kiel spektanto;
Sed nun jam kulisojn penetras kun lanto.
Novmondo aperas, kun siaj rololoj,
Ĝis tiam kaŝita por ciaj okuloj.
Sed ci jam eksentas doloron amaran;
Ci nun ne plu ĝuas plezuron koloran;
For la iluzioj... pludubi maleblas...
Espero nur vanas kaj cert'...malagrablas!
Ĉu tia do estas la Mondo en Vero?
Teatro en kiu rolulas kun klero
Laŭvice aktoroj de sama la trupo,
En ĉiuj la roloj, en solo, en grupo,
Publike aspektas amikoj, sin amas;
Aŭ jen malamikoj kaj sin anatemas.
Sed en la kulisoj, sen pluaj ŝajnigoj,
Komplice kunridas: plej bonaj kolegoj!
Nur unu solmano mem ilin manovras;
Decidas ĉu tiu heroas aŭ povras;
Ĉu tiu alia perfidos l'amaton,
Aŭ mem sinoferos spitante la faton.
Sed fine por ĉiuj nur io solpravas,
Kaj signas la celon jen kiu plej gravas:
Tromplogi l'publikon sen zorgi la klason,
Por monon venigi amase en kason.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 9an/3/1970.

B.G.D

# Inicado (Sesa averto)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Plej elrevigita ci estas...videble!
Kaj tio efikas al ci malagrable.
Ci estas premita de peza angoro;
Silentas en brusto...ne batas plu koro...
Solece ci staras en nigra abismo,
Kaj provas rezisti al finihilismo.
Al ci jen atakas hurlanta la hundo
De vivoribelo el karna la fundo.
Animo protestas, postulas Justecon;
Ci volas al homoj reveli la falson;
Sed eĉ la spektantoj, publiko bonvola,
Aktoroj mem estas: trompado banala!
Ci staras ŝafide kun cia la Vero
En lupa medio sen plua espero,
Kaj ci ne komprenas pro kia motivo,
Ci restas mirakle pludaŭre en vivo.
Sed estas facile l'aferon kompreni:
Personan finrolon ci devas memteni.
Ĉar nur ci kapablis, sen plua komento,
Atingi ĉi tien en ĝusta momento,
Kaj ankaŭ povsciis, solece en morno,
Rekovri la "ostojn kabalajn" per karno.
Ci nun inicito plej grava fariĝis,
Kaj al ci "mantelan protekton" aljuĝis.
Finvenkis ci ĉiujn malhelpojn inicajn,
Kaj plue alspitis kromprovojn koneksajn.
Allogajn kaptilojn per mono, virinoj,
Facile eskapis per lertaj sinturnoj.
Libere ci povas nun agi laŭvole;
Pri ĉio senpere decidi nur sole;
Malfermi la Vojon - malmola sagpinto -
Al la postvenontoj de l'espertaĉmento.
Kaj nun, ci al ci mem, dum koro amaras,
Demandas: ĉu vivi por tio valoras?
Ĉu tiom necesis da penoj, da luktoj,
Da ĉiaj suferoj en nigraj baraktoj,
Por fine konscii pri celo plej vana,
Pri zorgo konstanta, kaj peno senfina?
Je kio utilas konscio sen povo,
Tutkosma priscio por homo nur sklavo?
Samkiel grenspikoj ni kreskas robote,
Kaj baldaŭ falĉilo nin tranĉos rikolte.
Eskapi la sorton neniel ni povas;
Ĉu havi konscion pri tio do pravas?

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 15an/3/1970.

B.G.D

# Inicado (Sepa averto)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Jen estas l'areno por l'lasta batalo:
Ci nun ĝin eniras sen zorg' pri fatalo.
Foriĝis de spleno la peza envulto,
Kaj firme ci celas plenumon de kulto.
Ci devas alfronti sovaĝan virbovon,
Por montri praktike superan la povon
De l'homa spirito sur blinda perforto,
Kaj por liberigi, per helpo de morto,
Diecan l'animon el nigra karcero
De l'korpo besteca por nova espero.
Antaŭe necesis, por tiu plenumo,
Ke ci mem cin vestu per vesto de lumo.
De drasta traktado, kun vera humilo,
Ci nun plenkomprenas pri nepra utilo.
Pri ankaŭ neceso plej lerte manovri
La ŝtofon skarlatan kaj finte sin kovri,
Por lastaminute, frontante al Vero,
La beston mortigi per spado sen pero.
Jen estas la sorto por la inicitoj,
Trudita de amo al siaj homfratoj:
Pri novaj ekkonoj penegi memvole,
Kaj homan stultecon alfronti plej sole;
Malfermi novpordon por plua progreso;
Al falsaj la dogmoj mem spiti sen ĉeso,
Ke, iom post iom, per lumo de Vero,
La cerboj senuzaj ekbrilu pro klero;
Ke ĉiuj la homoj, pro klara konscio,
En Paco alcelu al Nova Socio,
Kaj tiel kunhelpi, sur tuta la Tero,
Atingi stadion de Amo kaj Vero.
Jen estas la celo sen ia profito,
Krom tiri animojn el stulto kun spito.
En ringo arena malfide ne pentu!
Sed kornojn minacajn prefere atentu!
Ne zorgu la mokojn de tiuj sidantaj
Ĉirkaŭe, ŝtupare, kun krioj incitaj;
Sed timu doloron de frapo perkuta,
Kaj drastan suferon de morto perbruta,
Sankcio de ebla tro granda fidemo
Pri propraj kapabloj laŭ vanta la memo,
Ĉar sekve necesus, per nova ekzisto,
Plipene fariĝi denove "artisto".
Jen estas la Vojo senfina...eterna...
Jen estas de l'homo la sorto konsterna...
Jen de inicado la rolo stevena!
Jen de l'inicitoj la Krono dornplena!

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 17an/3/1970.

B.G.D

# HE, SOCIO !

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Krom hipokriteco, iluzi', mensogoj,
Kion povas ci oferi min, socio?
Krom ekspluatado, daŭraj militigoj,
Impostorabado, trompo, falsa scio,
Soldatservo kaj fitrudaj ŝtatonormoj...
Prostituo, klabpolico kaj korupto,
Jen plej belaj kaj allogaj ciaj ĉarmoj!
Vampirino ci nur estas kun volupto,
Kaj abismo plej mistera kaj sen fundo.
Cin plenigi oni provus sen rezulto;
Ne konebla estas cia la profundo,
Tia provo nure estus grava stulto.
Min ci povis dum junaĝo iluzii,
Igi min batali por vidvin' kaj ido,
Dum ci ĉiam nur klopodis koluzii,
Kun potencaj l'adorantoj de perfido,
Kaj infanojn proprajn interbataligi,
Por establi staton de misekvilibro
Permesanta al ci disigante regi
Kaj instigi al militoj kun korvibro.
Nur potencon, ĉu per mono, ĉu per forto,
Ci alcelas ekster ĉiaj sentimentoj;
Tiranino, ci utilas nur al morto;
Cin ĝojigas nur militaj monumentoj,
Kaj la vastaj krucoplenaj "honorkampoj",
Kie putras en subtera lasta dormo
Ciaj idoj pro frenezaj ciaj trompoj,
Kiujn ili konsideris justa normo.
Ĉie vane ci flirtigas la standardojn
De pasintaj ciaj ĉarmoj; sed koketi
Ne plu helpas por inciti novajn ardojn,
Kaj devigi virajn seksojn sin erekti.
Ciaj trajtoj kadukiĝis, plensulkiĝis,
Pluaspektas malgraŭ farboj plej malbele,
Kaj malvirtoj nur per kiuj ci famiĝis,
Nun sin montras plej malkaŝe kaj revele.
Prostituistino ĉiam ci nur estis,
Kaj aspiras nun al digno kun ekscito;
Sed memoroj pri la tempo, kiam festis
Ci, en cerboj ĉiam restas kun profito.
Nun ci povas provi ŝanĝi cian robon
Kaj paroli pri tutnova sociordo;
Jen pro tio de mi peti la aprobon
kaj alvoki pri tutmonda homkonkordo:

La salivon ci nur uzas senutile;
Balastaĵo ci fariĝis sen fekundo,
Kaj ci povas plureklami perfektstile,
Superflua nun ci estas en la Mondo.
Troigeme ci postulis homoferojn,
Sen neniam memdonaci por repago,
Kaj nur ci mem, neglektante homesperojn,
Finalvenis al fiasko pro misago.
Ne bezonas homaj la individuoj
Kolektivorabantinon kompetentan;
Sed deziras kore, sen postulopluoj,
Veran edzinhelpantinon komplementan.
Se perfidas la edzino sian rolon
Kaj troigas, ŝi ne miru se la edzo
Ŝin forlasos, eltirante sian kolon
For el jugo de edzina la frenezo.
Tiel estas sur la Tero, he, socio!
Ci jen estas la edzino ĉies homoj;
Al ci ili serve helpas kun konscio;
Sed ci ilin servutigas sen kromformoj.
Tamen nure ci per ili pluekzistas;
Pro iliaj bonvoleme kaj ageme;
Se iliajn la postulojn ci neglektas,
Cin utilos nek perforto, nek subpremo.
Ĉar nenio ci jen estas sen homvolo;
Cin individuo tute ne bezonas;
El spirita stato ĝi mem por savrolo
Al ci venis kaj memvivon al ci donas.
Sen ofero ĝia plue ci sterilus
En eterna nokto de besteca menso,
Same kiel Luno en ĉiel' ne brilus
Sen la Suna lumo, kiel granda lenso.
Sed ci tute aliigis la realon;
Firme fidas ci pri propraj iluzioj;
Antaŭ Vero ci etendis la vualon
De falseco kaj senbridaj fantazioj.
Nun ci kredas, ke ci estas Mondreĝino;
Ke la homoj nure estas ciaj sklavoj;
Ke adori ili devas cin sen fino
Kaj cin danki eĉ pro daŭro de homvivoj.
Dum per cia misterplena oficado;
Per decidoj obeemaj de loĝioj,
Sociordo jen fariĝas nur fasado
Por okultaj senkonsciaj kolegioj,

Kiuj dioj sin mem nomas superhomaj;
Memarogas al si rajton homojn juĝi,
Por selekti ilin sen skrupuloj kromaj,
Kaj al sektoj trudi ilin ekaniĝi.
Por individuo povas ci nenion,
Krom malhelpi al ĝi, al mensdisvolviĝo,
Krom ĝin ekspluati, al ĝi rabi ĉion,
Ĉu en la ĉefurbo, ĉu en la vilaĝo.
Eĉ privatajn hejmojn trude ci penetras;
Ĉio virta por ci estas ja insulto;
Pro ci al gepatroj idoj akre sakras;
Nur malvirtojn ci pluflegas per fikulto.
Ĉion noblan ci plenzorge kalumnias;
Ci forlogas la plej fajran bonvolemon;
Ĉion puran ci plezure ironias
Kaj malhelpas inter homoj la estimon.
Ion bonan ne plu eblas cin aljuĝi;
Ci nur estas morto ĉies homvivanto;
Apud ci jen povas ĉio nur putriĝi
Pro la ŝtato cia fiprostituanto,
Kiu vestas cin jen diversnaciece,
Oferante cin por momenta nur kontemplo,
Kaj prostituadas cin plej konscience
Sur la "pavimaro" en la "Kort' de l'Templo".

Krom malbelo, kadukeco kaj ...mallogo,
Kion povas ci oferi min, socio?
De la vivo nun por ci jen l'epilogo:
Memkomprenu do pri mia ironio!
Eble iam, dum la tempo cia juna,
Al ci homoj kun fervoro ame kultis;
Sed en ci, nun, kiel en gastej' hispana,
Trovas mi nur tion, kion mi alportis.
Kaj mi prave povas diri malcinike,
Ke mi sole kreskis malgraŭ ciaj baroj,
Kaj asertas plue, ke mi pli efike
Estus progresinta inter prabarbaroj.
Ci ankoraŭ povas min pli servutigi,
Eĉ pluapartigi, sed neniam faros,
Ke konsentos iam mi al ci min ligi,
Ke mi cin agnoskos kaj al ci fervoros;
Ke kun ci pluhavos ion mi komunan;
Cin mi abomenas, naŭze cin ekvomas...
Sorton for de ci deziras mi malkunan,
Jam por mi ci ne plu estas: nur fantomas.

Ĉar per cia plurmiljara misagado
Ci fariĝis nur kaverno de rabistoj,
Kiuj mastras per ŝtateca maskerado
Kaj la helpo de senhontaj "fiartistoj".
En ci ĉio estas nepre detruenda;
Al ci jen kompare sterko bonodoras;
Pro ci vane pledus homa voĉo plenda:
Pri detruo cia Dio jam fervoras.
Pri " l'Virino" preparita dum jarcentoj,
Ornamita per juveloj kaj per ...belo,
Jen eksonas de l'Ĉielo la dekretoj
Pri malindaj ŝiaj agoj kaj ...forpelo.
Ekfunkcias jam giganta buldozego
Por forigi el la tuta Tersurfaco,
Per premiga kaj kompleta forglatigo,
Pri ŝi eĉ memorojn, ke finregu Paco.

Krom ignoro, silentego kaj ...buŝelo,
Kion povas ci oferi min, socio?
Ĉion eblan ci provadis, kun la celo
Min detrui pro privera mia scio.
Min ci testis per maljusto kaj per krudo,
Per laboroj plej malnoblaj kaj penegaj,
Per soleco senkompata, ankaŭ trudo
De elprovoj superhome malinstigaj.
Nun, pro tia plej drastega fitraktado,
Frosta ŝtono ekfariĝis mia koro,
Kun rezisto senŝancela al klopodo
Min nuligi, kiel nigra la marmoro.
Fremda gast' en cia korpo nun mi estas,
Kiel feto ĉe komenca gravediĝo;
Kontraŭ mia ekĉeesto ci protestas
Kaj aborti ci plupenas sen prestiĝo.
Forgesante ciajn neprajn patrindevon
Kaj virinan vivkialon sur la Tero,
Ci nur volas memdisponi cian vivon,
Por ĝin ĝui en plezuroj kaj libero.
Sed plej vanaj fine estos ciaj streĉoj;
Tro potenca estas "Tiu" la Sennoma,
Kiu povas el plej aĉaj putraj feĉoj,
Mem rekrei estojn kun esenco homa.
Ĉu kapablas ci kompreni, he, socio?
Nur nenio ci jen estas sen konsisto,
Sen eĉ veraj unueco kaj konscio,
Sen eĉ propraj fiksa punkto kaj rezisto.

Kiel akvo de l'rivero, ci ekzistas
Nur por bordoj, kiuj donas al ci formon,
Same kiel pro la klifoj mare estas
Sur la Tero, riceviante de ĝi limon.
Jen kiele ĉio statas en benfarto,
Jen la fonto de ĉiesa la feliĉo.
Se komprenas sian rolon ĉiu parto,
Vivo fluas sen konfliktoj kaj sen kriĉo.

Nur necesas ekkonsenti kaj benvoli;
Ĉiam eblas harmonia kunvivado
Ja, se ĉiu mem, sen spiti kaj ribeli,
Ekagadas kiel vera kamarado,
Kies vive koneksiĝas kun l'aliaj,
En la kadro ĝenerala de l'homaro,
Super ĉiaj fikonceptoj primaciaj,
Per benvolo, interhelpo, solidaro.

Nur necesas ekferigi la vualon
Plurmiljaran de instruo mistikplena
Pri falsaĵoj, kaj ĉesigi la skandalon
De regado eklezie faraona.

Nur necesas ekferigi monon, klasojn,
Kaj treigojn de la ŝtatorabistaro,
Limigante ĝiajn povon kaj ekscesojn
Per senigo de decido pri leĝfaro.

Nur necesas nun ekzorgi senprekraste
Pri homaraj evoluo kaj fincelo,
Kaj kunigi ĉies fortojn por plej haste
Ekatingi "sociordon-kun-utilo".

Nur necesas, ke la homo havu rajton,
Ankaŭ eblon, ĉeestadi en kunveno,
Partopreni mem, sen pero, la diskuton,
Unuvorte: esti vera sociano.

Nur necesas, ke rilatoj inter homoj
Ne plu havu la profiton kiel bazo;
Ke la raso ne plu estu de pogromoj
La preteksto diplomata je okazo.

Nur necesas, ho, socio! ke benvole
Ci agnosku mian rajton pri monataro,
Ke ci helpu al mi vivi ne plu sole
Kaj ne celu ekspluati min sen baro.

..............................

Nur necesus min atenti...sed...negrave...
Se sur strando mi ondete nun ekmortas,
Por sancela la plenumado impulsive
Nenombrebla ondetaro min eskortas.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 15an/6/197

B.G.B

# ANONCADO (°)

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Ek, dormanto! nun leviĝu, estas horo!
Ek, al nova Tag', al nova la laboro!
Urĝas tempo! Novan Vojon ni ekiru,
Kaj necesas, ke plej nepre ni nin biru.
- Ĉu neniam vi mem dormas, ho, tedulo,
Ke senĉese vi min vekas sen skrupulo?
Kie estas la revplenaj infannoktoj
Tute senaj je senĝenaj viaj ruktoj?
Nu, konscio, ĉu utilas nun nin biri?
Ĉu necesas novan vojon plu ekiri?
- Malkonvene, vi, animo, al mi spitas;
De tro longe ja ni ambaŭ kunekzistas;
Vi memvekis min en tiu mortovalo,
Dum mi restis en forgesa dormvualo,
Per l'unua "kial?" spite balbutita,
Sen eĉ scii pri la sekvo senevita,
La lavango da kialoj konsekvencaj,
Kaj da solvoj frenezige diverĝencaj,
Kiujn nova mi Herkulo ekalfrontis.
Plej fervore al plenumo mi volontis,
Kaj silente mi penegis en aktivo,
Por vin helpi konscience dum la vivo.
Do ne plendu, ke tro bone mi funkcias,
Ke pro mia laborego vi konscias:
Vi mem kulpas, min vokinte malprudente.
Al ripozo mi mem emus plej konsente;
Sed malebla jam fariĝis la afero,
Kaj ĝis morto vi konscios sen espero.
De nescio forlasinte la Edenon,
Nun de kono ŝvite plugu la terenon!
Nur estiĝas la afero tre kompleksa,
Ĉar jen estas la tereno tre ampleksa.
- Konsentite! sekve, kial plue peni,
Por al sama loko ĉiam nur reveni?
Senutilaj estas homaj fortostreĉoj
Por eltiri homanimojn el Terfeĉoj.
Fine ĉio: materio kaj spiritoj,
Refariĝos samaspecaj kosmaj splitoj,
Atomeroj el malluma nebulozo,
Kiu, per blindiga fulmapoteozo,
Reaperos en senlimo kiel suno,
Kaj, pli poste, kun planedoj...Tero...Luno...
Eksinsekvos la kvar aĝoj de la Tero,
La "kvar" regnoj, kun homaro ja, en Vero!
La kvar rasoj, la di-civilizacioj,
Kies kvara estos "Dio-de-la-dioj",
La okulta "Maljunulo de la Monto",
"Nekoncepteblulo" kaj spirito fonto,
Solligilo inter korpo kaj animo,
Tutpotenca sur la Tero ja sen limo.

(°)Ĉia malsimileco kun la fame konataj praaj mitoj nur fontus el nekomprenemo de la legintoj.

Finalvenos religioj...sociismoj...
Sen paroli pri regulaj cikloskismoj,
De statika stat' al stato dinamika,
Jen natura la procez' ekonomika.
- Ĉuste tial mi denove vin revekis!
Kaj konfesu, ke en tio mi ne pekis;
Ĉar la vojo por vi tiom malincita
Estas tiu al novstato aludita.
Jen la mezon de ferаĝo ni ĵus pasis;
La statikan malnovstaton ni forlasis;
Nun ni staras en la stato dinamika,
Ĉe la sojlo de la horo erotika;
Sed komencas jam, pro ciklimplikiteco,
Sin sentigi taginfluo el novspeco.
De homara la feliĉo la miljaro
Komenciĝis...kaj finiĝos en amaro.
- Mi do pravas ribelante kontraŭ kulto
Al doktrino kondukanta al ĉi-stulto,
Kaj naskita de la homa fantazio,
Nur por bredi homojn ja per iluzio.
L'homa saĝo nur kapablas ĉion falsi,
Por orgojle superhoma sin mem taksi;
Sed ĝi tian superecon jen atingas,
Nur se ĉiuj subiĝeme sin distingas.
Geniuloj ne ekzistas sur la Tero,
Sed nur homoj sur la Vojo al la Vero,
Kiujn vivocirkonstancoj dise lokas,
Al diversaj taskoj ilin trude vokas;
Sed, pro trapasado de la punkto Nulo,
Estas homo ĉies hom' samkapablulo.
- Jes!...almenaŭ ĉe koncipo, nun vi pravas!
Sed, pro tia dislokado, ĉu ne havas
La unuaj sur la vojo nepran devon,
Profitante jam pli fruan sciricevon,
Meminstrui kaj memhelpi la sekvontojn,
Por mildigi la plej akrajn vojalfrontojn?
- Kompreneble! tia estas l'evoluo...
- Ĉu?...kaj tiel nur memhelpi per instruo
Al malindaj finatingi tutpotencon,
Al brutemo servutigi konsciencon,
La "simiojn" memprovizi per spirito,
Al detruo puŝi ilin kun incito,
Same kiel al infano memkonsente
Oni donus revolveron malprudente.
Ĉu necesas plu komenti? Tre danĝeraj
Estas manipuloj de konceptoj veraj;
Kaj, cetere, ĉiu povas, sen cenzuro,
Legi ilin en la Libro de l'Naturo.
Nur la vere indaj rajtas memkompreni,
Kaj kapablas ĝis la Celo finelteni.

Jen la drasta plej natura selektado;
Ĝin modifi hom' ne rajtas, kamarado!
Nure Dio, kiu povas rekonstrui,
Liberrajtas propran verkon memdetrui.
Kia estu la aparta kontribuo,
Tie ne decidas homindividuo.
- Nu...plej bone! sed pro kio min reveki?
Ĉu por tian punkton nure plusubstreki?
- La demando ne montriĝis senutila,
Kaj ĝi estis efektive ne futila,
Sin trudinte, kiel bazon plej necesan,
Por eniri novan vojon alprogresan.
- Al progreso kia? Vanas la invito!
Malaperis la interna vivekscito.
Kial agi? Al mi mankas ja motivo!
Ĉio falsas, reveliĝas nur fiktivo,
Kaj, en monda la teatro, jen la dramo:
Ĉieskonsentita estas la programo.
Sekve, kial pluprodigi memoferojn,
Por ĉe fino nur ricevi moksuferojn?
Senutilaj Di-servantoj ni jen estas,
Kaj kun tio plej volonte mi konsentas.
Por Li tamen ĉiam pretis mi ekŝtormi;
Sed deziras nun, se eblas, pace dormi.
La kapablojn ricevitajn ĉe naskiĝo
Mi poluris per laboro sen prestiĝo.
Mi do povas nun ripozi plej trankvile:
Mian taskon mi plenumis konformstile.
- Senrezerve mi admiras vian lerton
Vin justigi alvokante propran sperton.
Bedaŭrinde tiu lasta ribeltrovo
Vin ne helpos antaŭ nova vivelprovo.
Tiel simple ne aspektas la afero:
Memrezigni ne plu povas vi, en Vero!
Tro fervora estis mia memvolonto:
Ne plu eblas al vi dubi pri l'estonto,
Pri situo via en l'evolufluo,
Pri la nepra rol' dum via vivopluo.
Pro finvenka verklopodo sen reteno,
Vi estiĝis mem ĉenero de vivĉeno,
Kaj pro via forlasiĝo nur homskala,
Ekrompiĝus "l'Ora Ĉen' " universala.
- Jen sufiĉas! nu, konscio, vi troigas!
- Protestvortojn senutile vi prodigas.
Vi ja scias, ke mi pravas senrezerve,
Kaj nur celas plej utili al vi serve.
Mi konektis por vi tiom da nociojn,
Ke vi staras jam samrange kun la dioj.
Terheroo iĝos vi, eĉ kontraŭvole,
Kaj aktivi nun vi devas proprarole.

Nu, konfese, kamarado, ĝin vi diru:
Ĉu utile estis ne, ke ni nin biru?
- Mi konfesas vian helpon senkomparan;
Sed traspertis mi traktadon tro amaran,
Sen edzino, sen amikoj, sen subteno,
Sen kompensoj familiaj, sen kompreno...
Kiel planto plej sovaĝa en dezerto
Mi solkreskis en konstanta spitosperto.
Maljusteco ĉiam estis mia loto;
Nur realo min instruis sen dorloto;
Mi aliajn tamen helpis sen skrupulo,
Kaj estiĝis...primokata naivulo,
Kiun oni riproĉadis malamike,
Asertante kaj mokante plej cinike,
Ke ne sciis mi aprezi la valoron
De ebleco ĝui helpan kromlaboron;
Sed neniu, en okazo de bezono,
Por min helpi iam staris je dispono,
Nur...sed tio estas nepra la escepto,
Kaj konfirmo pri pravigo de koncepto.
La socio min feroce ekspluatis,
Min malamis, malhelpadis, malkompatis...
Kaj mi devus, kun naivo blinde plua,
Al ĝi helpi pro motivo evolua?!!
Komprenemon? Bela estus ja la moto,
Dum mi pensas: putru ĝi en sia koto!
Memkomprenu vi, konscio, ke tekniko
Ne sufiĉas por konvinki en praktiko.
Entrepreni ne postulas la esperon,
Kaj persisti de sukceso la makleron,
Sed necesas, ke ekzistu, ĉe okazo,
Vivkialo kaj vivemo kiel bazo.
Nu, rigardu en malluman mian koron,
Kaj vi vidos, se ne timas vi angoron,
Oceanon senprofundan kaj senliman,
Kie Lun' nenia naskas brilon gliman:
Jen la larmoj senkompense oferitaj
Dum la vivo al homfratoj hipokritaj...
Sed,ne timu, plonĝu! kaj, sub la surfaco...
He! atentu! ne tro vastas ja la spaco.
Ĉu ne estas admirinda la spektaklo?
De vivĝojo mia jen la tabernaklo!
Tempon vi ne perdu vane en esploroj:
De esperoj, iluzioj kaj rankoroj,
Eĉ de ĉiuj homsperteblaj aferetoj,
Nu, ĉi tie, ĉies estas la skeletoj.
Fido tie ne plu rajtas, nek kredemo,
Kaj vi vane ilin vokus kun voĉtremo.
Ĉiujn homajn sentimentojn mi konfidis:
Ĉiuj same kaj laŭvice min perfidis.

Nura sablo sen konsisto estas vivo,
Ĝi, pli ĝuste, vere estas nur fiktivo.
Pli reala kaj eterna estas morto;
Ĝia jugo ne ŝuldiĝas al perforto,
Kaj se juĝi ni kapablus pri la nuno,
Al ni vivo nur aspektus kvazaŭ puno.
Nun bonvolu, en ĉi tio, al mi montri,
Kie kuŝas viv-kialo, ĝin demonstri,
Kaj, se tion vi kapablas, jen promeso:
Novan vojon mi ekiros al progreso.
– La afero tute simpla ja aspektas,
De tro longe saman sorton ni prospektas;
Viajn spertojn mi mem spertis kaj elportis,
Ĉar mi ĉiam kun fidelo vin eskortis,
Kaj, se iu pri la sorto rajtus plendi,
Estas mi mem, kiu provis vin amendi.
Sed pri tio ni forigu la eksplikojn:
Ne utilas kompliki gi la implikojn.
Al demando via nun jen la respondo:
Ne sufiĉas malhelpadi en la Mondo,
Ke atingu al la Vero la malindaj,
Ankaŭ nepras, ke sin montru la malblindaj,
La signitaj de la sorto, la elito,
La unuaj sur la Vojo de l'spirito.
Ju pli gravaj estas homaj roloj, povoj,
Des pli drastaj estas testoj kaj elprovoj.
Nun vi povas taksi, sen aparta lerto,
La gravecon propran per la propra sperto,
Kaj decidi, en sekreto de la koro,
Se plej vana restos via la laboro;
Se l'oferoj kaj suferoj plorigantaj
Nure estis amuzaĵoj diletantaj;
Se pro ia resto da orgojlo spita
L'evolua ĉeno estos finrompita;
Se pro tio – kaj por kiom? – la Homaro
En mallumon ekrefalos kun amaro,
Ĝis, finfine, retrovita estos vojo,
Kaj pli draste vi testita per malĝojo.
Nun, per kiaj argumentoj plej subtilaj
Vi sukcesos igi miajn senutilaj?
– Nu, la ludo al vi ŝajnas tre agrabla:
Vi konjektas jam pri fina venk' probabla!
Sed al mi ĝi tia vere ne aspektas:
Pro tro da logiko ĝi al Ver' ne rektas.
Ĝi provizas min per nova argumento,
Kaj pro ĝi en mi vekiĝas praa sento...
Tiam estis mi virino kun Adamo;
En Edeno ambaŭ vivis ni sen dramo,
Obeante senribele Di-ordonojn,
Kaj ĝuante ĉiujn la Edenajn bonojn.

Malpermeso nura estis, sen neglekto,
Pri l'Adama vira sekso en erekto:
"Nur de tiu arbo, kun aspekto vanta,
Meze de harbedo rekte elkreskanta,
Se vi manĝos frukton, ĝi al vi alportos,
Post plezuron, nur amaron, kaj vi mortos.
Ĉar ĝi estas aroganta la simbolo
De la Tempo rezistanta al Di-volo,
Kaj post esti vi manĝintaj ĝian frukton,
Vi eniros de mortcikloj l'aĉan dukton,
Kaj, de mortoj kaj senĉesaj renaskiĝoj,
Vi spertados pri vorticoj kaj vertiĝoj,
Ĝis vi estos alvenintaj al konstato
Pri eraro via celi al kon-stato.
Ĉar neniam homoj el la Terovaloj
Vive povos min senigi je vualoj.
Nur la inicitoj, finvenkintaj morton,
Vidos min en gloro, spertos mian sorton,
Kaj profitos, kiel nun vi en Edeno,
La senfinan feliĉecon de senpeno."
Tion Dio al ni diris, kun severo,
Dum scivolis ni pri l'vira seksmistero.
Sed al mi vi venis, kun admono tenta,
En figuro via tiam jen serpenta,
Dum Adamo, kun senhonta seksostreĉo,
Plej trankvile dormis en ĉi tiu skeĉo.
Kaj vi min instigis, fia pedagogo!
Malobee spiti Dion per tromplogo:
"Vi nur multobliĝos, kiel Sunradioj,
Sur la Tersurfaco similos je dioj..."
Pri la sekvo ĉu utilus la rakonto?
En la Mondo ĉiu scias pri pekfonto,
Pri la ago de unua la homparo,
Kiu mortis, diseriĝis en homaro.
Kial do mi vin aŭskultis, ho, serpento?
Kial do mi ne rezistis je la tento?
Senmortecon ni profitis tiutempe;
En Edeno ĉiam estis nur printempe;
Sen doloroj nek suferoj pasis vivo;
Al la grundo senutilis homaktivo;
Do pro kio ni bezonis spiti Dion?
Kaj, pri bono kaj malbono, havi scion?
La afero nun aspektas nura stulto:
Ĝi sintrude pripensigas pri envulto...
Kaj denove vi pretendas min instrui,
Per tromplogoj samaj provas min influi...
Kial tiom da obstino senutila?
Da trompado post miljaroj plej simila?
Kia estas via celo? Ĝin vi diru,
Se vi volas, ke mi kun vi nun pluiru.

-Jes, mi estis la serpento, ho, animo!
Kaj de mi mem nure iĝis la viktimo...
Mi tutsole nur ekzistis ĉe komenco
En senlima kaj senfina Eterneco.
Sed deziro en mi kreskis, kun obstino,
Meti finon je enuo de senfino.
Kaj finiĝis, jam de mia ekdeziro,
L'aranĝiĝo harmonia en mistero
De substanco mia. Tempo, Spaco ekaperis;
Energio Materion ekkaperis;
Komenciĝis la tutkosma batalado,
Kaj de morto displitada la parado.
Universoj, galaksioj, sunsistemoj
Multobliĝis ĝis ĉielaj la ekstremoj,
Kaj, en ili, ĝis plej etaj atomeroj,
De mi partoj ektroviĝis en karceroj.
Detruite, dissplitite, dissemite,
Al la sorto staras mi de tiam spite,
Kaj, per daŭra klopodado konscienca,
Celas al statunueco dekomenca;
Penas rekunigi, ĝis plej eta skalo,
Miajn korpopartojn en senĉesa falo.
Per konstanta volostreĉo energia
Tiras ilin purigitaj suprasferen,
Kaj denove plurevenas malsuperen
Por alfronti mortanĝelon sur la Tero,
Kaj eltiri homanimojn el l'infero
De nescio kaj de korpaj la pasioj,
Kie regas mono kaj fireligioj.
Estas mi l'Universala Radiado,
La ĉiela fajro, Dio en agado,
Bazo de ekzisto, fonto de vivfluo;
Tutan Kosmon regas mia meminfluo,
Sed, sen vi, animo, povas mi nenion.
Sen vi, kiu naskas ĉion, kaj eĉ Dion,
Sen vi, Kosmohisto, helo kaj malhelo,
Perantino inter Tero kaj Ĉielo,
Kaj Eterna Saĝo, Diokonscienco,
Kiun kreis mem la Patro ĉe komenco;
Sen vi, Di-patrino, akvofonto, Stelo,
Portantino de la Lumo kun fidelo,
Sfero intelekta, spito al koncentro,
Sen cirkonferenco, sen nenia centro,
Sen vi, Groto kun neatingeblaj vandoj,
Maro, kies estas universoj strandoj,
Mi ne povus havi penson primisian,
Kaj ankoraŭ malpli emon primesian:
Kio estus Oziriso sen Izisa?
Kristo sen Maria? Vero sen Temisa?

Dum Adamo sole restis en Edeno,
Dio-blovo nestis mi ĉe li en pleno;
Sed, pro via kreo poste decidita,
Dualiĝis mi sen kontraŭstaro spita:
Kiel estus rezistinta mi Di-celon,
Ne, sur Tero, gloriginta vian belon?
Ne kreinta el Adamo, Patra bildo,
Belan Evan, bildo via kaj homido?
Same kiel vi devenis el Di-amo,
Tiel same Eva fontis el Adamo ;
Sed pro tia homdisiĝo dekomenca,
Mi fariĝis mem spirito triesenca.
Ĉar l'animo , enblovita en Adamon,
Dispartiĝis por vivigi duan homon:
En Adamo mia volo plue restis,
Dum en Evan l'intelekto fuĝe nestis;
Kaj mi, tria, kiu tenis ilin kune,
El Ĉielo forpelita iĝis pune,
Pro plenumo sur la Tero, per firolo,
De l'Homara evoluo laŭ Di-volo,
Kiun mia ekdeziro funkciigis,
Kaj al nova kreociklo ĝin instigis.
Tiucele, mi, ondaro de la Kosmo,
Serpentiĝis por, rilate kun la homo,
Tenti Evan sekskuniĝi kun Adamo .
De l'komenco mi konsciis pri la dramo,
Kiu poste disvolviĝis tra l'Tempaĝoj.
Ankaŭ sciis mi antaŭe pri fiaĵoj
De la homoj en la fluo de l'miljaroj;
Pri kruelaj ĉiuspecaj la misfaroj,
Kiuj homan historion sur la Tero
Aspektigas, tra Tempkampoj, sangrivero.
Kaj pro tio ĉiucikle ĉiam penis
Mi mildigi l'homan sorton, kaj mem venis
Ofereme por malfermi novan pordon,
Kaj detrui la malnovan sociordon,
Kiu baris vojon al pluevoluo,
Per leĝaro dogma sen vivokongruo,
Kaj en la homaron, per spirita skismo,
Mem enplanti semon por Novhumanismo.
Miaj nomoj iĝis famaj en la Mondo,
Kaj de religio ĉiu estis fondo;
Sed per morto ĉiufoje mi mem pagis
La sangprezon al la ordo, kiu plagis.
Nur tiele la afero plenumiĝas,
Nur per morto Viv' je Vivo renaskiĝas.
Se la semo ne pereas en la grundo,
La kamparo ĉiam restas sen fekundo.
Pri naskiĝoj de popoloj la programo
Ĉiam sekvos nur la vojon de Abramo. (°)

(°) Unua nomo de Abrahamo.

Nur perforton nepre naskas la perforto,
Kaj kondukas al novstato sen komforto.
Kiaj estus argumentoj plej subtilaj,
Ĉiam estos la militoj malutilaj.
Eĉ dum Paco oni povas memdetrui,
Por pluevolui, por nove konstrui.
Harmonia kunlaboro kun korvibro
Pli necesas ol armila ekvilibro.
Sed la homoj, influitaj de sofismoj,
Memadoras al diversaj idolismoj,
Kiuj ilin disigite alfrontigas,
Ilin vigle al perfortoj pluinstigas...
Nome de konceptoj plenaj je missenco
Pri frateco, libereco, egaleco,
Ili anstataŭis la konceptojn, en homaro,
Pri pacamo, interhelpo, solidaro,
Kaj de homo, ĉies homoj kamarado,
Ili faris, per frateca disigado,
Fraton de frataro, mem, kun fanatiko,
De aliaj la frataroj-malamiko.
Malhumile ribelante, kvazaŭ reĝo,
Al l'eterna kaj natura Vivoleĝo,
En socio ĝin rabanta sen skrupulo,
De la homo homo estas servutulo,
Kies vivo eĉ dependas de plezuro
De kretenoj pro popola la prokuro.
Plej necesas nun malfermi novan pordon;
Anstataŭi tiun aĉan sociordon,
Kie reĝas komercistoj kaj gangsteroj,
Kiuj bredas en naciaj falansteroj,
La "homfratojn" per devigoj ĉiuspecaj,
Je la nomo de konceptoj frenezecaj,
Sen rilatoj kun realo kaj kun vivo,
Kiuj fontas el morbemo kaj fiktivo.
Plej necesas...sed, ĉu vi mem, sen obstino,
Volos naski ja la"Filon de l'Virino",
Kiu venus, ĉe la fino de la Tempoj,
Glore venki en materiismaj kampoj?
...............................

- Fajra glavo fulme lumis: mi ĝojkrias!
La vualo elŝiriĝis: nun mi scias!
Malfermiĝis la spirita lumosfero,
Kie reĝas vi, konscio, kun Di-klero...
La Estonto estantiĝas; nova tago
Komenciĝas kaj foriĝas l'homa plago...
Ĉie homoj ĥore kantas novan kanton...
Ĉu rifuzos mi obei Di-amanton?
Mia edzo kaj kreanto, ankaŭ Filo,
Mi konfesas mian kulpon kun humilo;
En mi agu per gracplena amindumo:
Plenumiĝu via Volo! Estu Lumo!

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 22an/10/1970.
B.G.D

# La kvara regno

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Nur tri regnoj en Naturo!
Jen normala la instruo,
La scienca kontribuo
Al konado sen maturo.

Minerala, vegetala,
Animala ili estas...
Tion akre mi kontestas,
Ĉar koncepto misreala.

Estus do ne diferenco
Inter l'homoj kaj la bestoj,
Malgraŭ ĉiuj la atestoj
De tekniko kaj scienco?

Mi konsentas, sen rezisto,
Ke la bestoj, pri strukturo,
Nin superas en Naturo,
Kaj instruas pri l'ekzisto,

Sed pro instinktologiko,
Kaj tro strikta konformeco
De la korpo, kun nepreco
De la vivo en praktiko,

Ili estas limigitaj
En apartaj propraj roloj,
Kaj fariĝas nur simboloj
Pri aferoj difinitaj.

De l'Naturo ili trude
Devas al la Leĝ' obei;
Ĝin elporti kaj perei
Se ĝi traktas ilin krude.

Dume homo, pro konscio,
Ĝin transformas plej libere,
Kaj eĉ povas ĝin senpere
Memdetrui, kiel Dio.

Ne necesas do desegno,
Por agnoski, ke sur Tero,
Homo estas ja en Vero,
La Natura kvara regno.

Kiel vintro en jartempo,
Ĝi memperas por renasko
De Novjaro, sen fiasko,
Ĉe komenco de Printempo.

Kaj, simile al la Suno,
Ĉiutage ĝi revenas,
Kaj eĉ nokte ĉiam penas
Naski vivon per la Luno.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

# Kial mi sopiras

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Plu ne rajtas mi pri amo:
Tro maljuna nun mi estas;
En la koro ne plu nestas
Vivprintempa l'arda flamo.

Tro da spertoj-kolizioj
Senkompate min instruis,
Kaj eĉ emon findetruis
Kredi je viviluzioj.

Mi atingis ja al saĝo;
Tial rajtas ekfieri,
Ke kapablis mi oferi
La plezurojn de l'junaĝo,

Ke sukcesis mi memregi
La impulsojn de la koro,
Por nur zorgi, kun fervoro,
Mem en Naturlibro legi.

Nun mi staras antaŭ trono;
Venke trafis mi al Celo;
Pro mi ĝojas la Ĉielo,
Kaj min kronas per orkrono.

"Linni gloru, la Venkinto!
La Heroo atendita!
La Homribelanto spita
Radianta ĉe Montpinto!"

Ĉu mi rajtas ja eĉ plendi?
Mi alvenis al la "fino"
De aparta glordestino...
Kion kroman plu atendi?

Okcidenten nun mi iras,
Al la Pordo de "l'Amenti", (°)
Povas mi do ne lamenti...
Kial plue mi sopiras?

Mi sopiras pro blondino,
Kiu venis tro malfrue,
Dum mi devis paŝi plue
Sur la drasta Voj' sen fino.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 10an/9/1970.

B.G.D

(°) Enirejo al la lando de la mortintoj.

# Ŝi estis

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Ŝi estis l'ekvido de miaj amrevoj,
Figuro gracia de blonda knabino,
Kaj bildo de mia ĉiama inklino
Sur vojo plenuma de miaj Homdevoj.

Ŝi estos la kaŭzo de miaj korkrevoj,
L'ultima ofero, kaj lasta fratino
De multaj aliaj en mia destino,
Jam fore fuĝintaj simile al mevoj.

Nenion saĝulo donace ricevas;
En la vivpokero plej nepre li devas
Antaŭe mempagi por rajti pri karto.

En tia grundaĉo ne kreskas la floroj;
Pli kaj pli kruela fariĝas la "arto"...
Pli kaj pli la koro pleniĝas je ploroj.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 23an/8/1970.

B.G.D

# Fratoj al Lum'!

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Fratoj al Lum', al Libero!
Fratoj al Ora la Sun' !
Ni, for el nigra l'infero,
Al Nova Tag' paŝu nun!

El tuta Mond' junularo
Venas al SAT-Asoci',
Kaj, per Raci' kaj memstaro,
Celas al Nova Soci'.

Man' en la man', kamarado,
Spite al ŝtata la stult' !
Nek homa ekspluatado!
Nek al la hom' blindokult' !

For nun de mono la plago:
Fonto de homa la pen' !
Flirtu l'esperverda flago
Super Homar' sen katen' !

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Pantin la 4an/9/1970.

B.G.D

- Gérant et imprimeur: C.Baudé , F 47 Laroque-Timbaut. Commission paritaire n° 39 863